

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 72. Decembro 25, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Frank Lappe.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alkroĉaĵoj: sen. Sume: KB 430

La tanzanianoj vin ege bonvenigas



Al la UK en Aruŝa aliĝis ĝis la 25-a de decembro 208 personoj el 42 landoj.

Festotaga saluto de ĉina poeto

<https://esperanto.cri.cn/2023/12/21/ARTITmKY84HhMhnGFLA2TdE9231221.shtml>

Mi legas la poemon "Nekonata Floreto" de Tang Dezhi, tradukitan de la ĉina Esperantisto Gaja. Agado por "Poemoj en la mondo". Bondeziroj por Feliĉa Novjaro.

Alessandra Madella



Jen el Nov-Zelanda Art-Centro festa bildo: egale ĉu por julio, la solstico aŭ ajna plia festado. EKO deziras al vi plezurigajn festotagojn!

EDE laboras sencede

Nia komuna celo estas konigi kaj progresigi Esperanton. En 2024, Eŭropo Demokatio Esperanto Francio volas afiŝi E-on dum la eŭropaj balotoj en la tuta Francio sur 30.000 oficialaj afiŝ-tabuloj proksime de lernejoj, sed mankas ankoraŭ kelkaj miloj da eŭroj. Donacoj kaj kontribuoj necesaj por 2024: - ĉu en formo de ĉekoj (pagindaj al AF-EDE), sendu al 98 rue Michel Ange, F-75016 Paris -- ĉu per transdono (IBAN: FR77 2004 1000 0151 6648 5A02 039; BIC: PSSTFRPPPAR; kontnumero: 51 664 85 A 020; ne forgesu indiki viajn kontaktajn detalojn por la imposta kvitanco, (kiu malkreskigas la imposton de 66 % de la elspezo por la francoj). Donaco de €100 eŭroj permesas presi kaj sendi ĉirkaŭ 10.000 balotojn aŭ plurmil cirkulerojn aŭ presi plurajn dekojn da afiŝoj.

ESPERANTO en EU estas por: pli justa, ekologia kaj efika Eŭropo, Ni defendu la rajton al eŭropa nternacia komunikado por ĉiuj.

Bernard Cornevin

Kursoj francaj kaj vjetnamaj

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso por plenkreskuloj en Perigozo (Périgueux)

Gvidantonomo: Claude Labetaa. Aldoninto: Rubekolo

Loko: Périgueux, Francio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27605>

Titolo: Mi estas vegano

Kategorio(j): Gramatika

Verkinto: Hoan TRAN

Temo: KI-vortoj, veganoj; Nivelo: B1, B2

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23755>

Filmeto pri scienco de la Universitato de Sevil

Filmo kun subtekstoj en Esperanto: https://youtu.be/fcVqu_G-zh8

Viko <viko@civencia.io>

Katalin Kovats kaj <edukado.net> rekonas la agemon

“Mi ŝatus atentigi vin ke pro sia valora kaj multflanka agado Viko ekde hodiaŭ estas en la Panteono de edukado.net. Gratuloj sub lia prezento tre bonvenas.

<https://edukado.net/novajhoj?id=899>

Rezultoj el la Nitobe-seminario nun rigardeblaj

La video-resumo de la 9-a Nitobe-Simpozio finfine estas aperinta. La Simpozio okazis fine de julio 2023 en la Universitato de Torino (UniTo), kaj ĝi estis kunorganizita de UniTo, La Universitato de Ulster kaj CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj). La temo estis ‘Post 75 jaroj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kia estas la stato de efektivigo de lingvaj rajtoj?’. La aranĝo estis trilingva (angla, esperanta, itala). Koran dankon al Rogener Pavinski pro lia grava laboro.

<https://www.youtube.com/watch?v=37YtQlXnO48>

Michele Gazzola, Universitato de Ulster, www.michelegazzola.com

Zamenhofaj festoj en Togolando, Ganao kaj Madagaskaro

En decembro lomeaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto havis intensajn Eo-aktivaĵojn, celebre de la Zamenhofa Tago per prelegoj, lumbilda prezento pri Esperanto, filmspektado, koncerteto de Rovema, ludoj kun Esperantolibraj premioj. Ni iris ekskurse de Lomeo al Agbodrafo, Togoville kaj Lomeo. Tagmeze tipa loka manĝaĵo Sifio kunigis nin ĉe tablo ĉe la Atlantika oceanbordo. La aranĝojn okazigis 'Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando' (APETO) kunlabore kun Esperanto-Plus Togo.



Adjevi Adje kaj aliaj.

Okazis Zamenhofa Festado en Ganao en la lernejo Lutherana kune kun klubanoj en la lernejo, teamo de ILEI Ganao kaj instruistoj en tiu lernejo. La speciala gasto estis s-ro Paul Kwesi Mensah, kiu prelegis pri la historio de d-ro L. L. Zamenhof. Ni kune



kantis la komunan kanton "Bona Amiko". Ni poste interbabilis kun niaj lernantoj dum kiam ili petis diversajn temojn pri Esperanto. Ni jam instruis Esperanton sep semajnojn en la lernejo. La lernantoj festos sekvontan semajnon kaj ni rekomencos instruadon de Esperanto

meze de januaro, 2024. Estas plano prepari lernantojn por skribi la ekzamenon KER-A1. Ni esperas ke la ideo kuraĝigos ilin plustudadi. Ni esploras eblojn kunlabori kun aliaj lernejoj tutmonde kie oni instruas Esperanton por ke niaj lernantoj havu okazon interbabili rete kaj koresponde.

Apelete Agbolo

Afrikan virinoj festis la Zamenhofan Tagon

EVAA (Esperantista Virina Asocio en Afriko) organizis retkunvenon la 15-an de decembro. Dankojn al 17 partoprenintoj el 15 landoj. S-ino Anna Löwenstein prelegis pri la vivo de Zamenhof, S-ino Miora Raveloharison prelegis pri EVAA kaj virinoj en Aruŝa. Simila kunsido okazis kadre de IKEF (Internacia Komerca Ekonomia Federacio): <https://youtu.be/meenzRUpvIM>

Miora Raveloharison, Madagaskaro

Zamenhofa Tago en Irano

Okaze de la Zamenhofa Tago en 2023 okazis prelego de prof. Humphrey Tonkin, honora prezidanto de UEA, en la Universitato de Tehrano pri 'Lingva Egaleco: Celinda Vojo por Mondo Dividita' kun persa interpretado, kaj prelego de la nova estrarano de UEA el Ĉinio, Gong Xiaofeng (Arko).

Jen kerna resumo de la prelego de Tonkin: 'Esperanto estis kreita por ebligi egalecan komunikadon inter ĉiuj homgrupoj surbaze de komuna lingvo. Sed ne estas klare, ke la ideo de lingva egaleco estas pozitive akceptata de ĉiuj homoj. Kiuj estas la obstakloj kiuj malhelpas lingvan egalecon?'

Trovu ĝin en la jutuba kanalo de ILEI: <https://www.youtube.com/watch?v=OeUGmKCLyXg>

Grava hungara libro alirebla

Fariĝis atingebla kaj elŝutebla en la Hungara Bitoteko de Tutlanda Biblioteko Széchenyi (<https://mek.oszk.hu/25200/25200>) la libro de Blazio Vaha 'Pri Esperanto kaj konektaĵoj', aperinta paperforme en 2018. La volumo entenas hungarajn kaj Esperant-lingvajn eseojn de Blazio Vaha pri Esperanto kaj koneksaj temoj kun eksterordinare vasta gamo, tial ĝi proponas temojn, kiuj povas interesi preskaŭ ĉiujn.

Jozefo Horvath, vortaro.hu

Mirejo rete komunikas kun Koreio kaj Japanio

Post unujara sperto pri retaj kunvenoj kaj post diskuto kun diversaj personoj en Koreio kaj Japanio mi ekde januaro 2024 proponas retajn kunvenojn en konvena horo por vi kaj mi. La detala priskribo kaj la ok datoj de januaro ĝis julio aperas en la retejo www.eventaservo.org. Vi tajpu "Eŭropo" kaj poste "Svislando". La unua tia reta kunveno okazos la 24-an de januaro. Ni vidos, kiel tiu nova oferto funkcios.

Mireille Grosjean, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo

Mondanoj

La oficiala apero de la bita unuopaĵo "La Junularo de Hodiaŭ" de la berlina rokbando 'La Mondanoj' okazis en la 15-a de decembro 2023. La unuopaĵo disponeblas elŝute en la muzikplatformo de Vinilkosmo kaj en la kutimaj aliaj elsendfluaĵ platformoj. Legu pli pri tiu eldono:

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/.../372-oficiala-apero-de...>



Alparolo de Lo Jacomo en ses lingvoj

En novembro 2023, ni eksciis pri grava interveno de s-ro François Lo Jacomo, reprezentanto ĉe Unesko kaj estrarano de UEA, en la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Li franclingve alparolis favore al Esperanto en la plena kunsido de la Konferenco. Ĝis nun, la triminuta alparolo restas spektebla en sia originala lingvo per la retejo de Unesko:

<https://www.unesco.org/fr/general-conference/42/speeches?hub=79837>

Nun tamen, oni povas ankaŭ spekti ĝin kun subtekstoj en la lingvoj franca, Esperanto, hispana, portugala kaj slovena, danke al la rapida kaj efika kunlaboro de tutmonda teamo de tradukantoj. La ligilo por spekti la subtekstigitaĵon de la filmeto estas:

<https://youtu.be/BpqnhQuGzqM?si=mHLlp0JynDu7bY-m>

Ni bonvenigas tradukojn de la alparolo de s-ro Lo Jacomo al pliaj lingvoj.

Pablo León, <opleon@gmail.com>

===== vortoj: 1115 =====

La kolekto de EKO por 2023: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 60). Por plio, vidu alian komunikon.